# *Caricom kaj Kubo festas 51 jarojn de frataj rilatoj*




**Kubo-CARICOM. Bildo: RHC**

Georgo-urbo, dec 8 (RHK) La Kariba Komunumo (Caricom) kaj Kubo atingas hodia? 51 jarojn post la starigo de siaj ligoj, plifortigitaj de la solidareca kunlaboro de la plej granda el Antiloj kaj la subteno de la bloko en la internacia areno.

Amba? landoj festas la decidon de Trinidado kaj Tobago, Barbado, Gujano kaj Jamajko establi diplomatiajn rilatojn kun Havano en 1972 kaj rompi la malamikan izolitecon kiun la kuba registaro alfrontis post sia revolucia triumfo en 1959.

Tia gesto malfermis la vojon por ke la ceteraj karibaj teritorioj disvolvu ligojn de amikeco kaj kunlaboro kun tiu fratina nacio kaj poste, en 2002, kondukis al la efektivigo de la mekanismo de la pintkunvenoj Caricom-Kuba.

?uste en tiu kunveno, la ?tatestroj kaj registarestroj de la integriisma bloko kaj Kubo konsentis establi ?i tiun daton por festi la komencon de siaj ligoj, konsiderataj kiel referenco por aliaj integrismaj projektoj en Latin-Ameriko kaj Karibio.

?i tiuj renkonti?oj okazas ?iujn tri jarojn por ekzameni kaj vastigi kunlaborojn kaj integri?ajn projektojn en kampoj kiel edukado, sano, energio kaj komerco, inter aliaj.

Dum siaj kvin jardekoj da ligoj, Kubo disponigis stipendiojn, teknikan helpon, dungitaron kaj medicinan helpon en situacioj de naturaj katastrofoj senpage kaj granda nombro da siaj kunlaborantoj liveras servojn en Caricom-?tatoj.

Unu el la plej signifaj ekzemploj de ilia solidareco estis la deplojo de pli ol 1 200 kuracistoj en Haitio por kontra?batali la ?olerepidemion, kiu trafis tiun antilan nacion en 2010, rezultigante milojn da mortoj kaj infektoj.

Siaflanke, la kariba grupo postulas en ?iuj internaciaj eventoj la tujan ?esigon de la financa, komerca kaj ekonomia blokado, kiun Usono tenas kontra? la Insulo dum pli ol duonjarcento.

La oka pintkunveno Caricom-Kuba okazis pasintjare en Barbado, kaj estis alia ?anco, kie la celoj estis skizitaj por plivastigi kunlaborajn programojn kaj plifortigi ligojn de frateco.

La fina teksto de la kunveno emfazis, inter pluraj aferoj, ke la partnereco inter la partioj estas ekzempla modelo de fruktodona kaj reciproke utila suda-suda kunlaboro.

Krome, la 6-an de oktobro estis deklarita Caricom-Kuba Tago kontra? terorismo, memore al la 73 viktimoj de la bombado de aviadilo Cubana de Aviación en la akvoj de Barbado, en tiu dato en 1976.

La na?a eldono de la pintkunveno okazos en Kubo en 2025.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/341598-caricom-kaj-kubo-festas-51-jarojn-de-frataj-rilatoj

Radio Habana Cuba